



Komencanto



Naila Sadretdinova [Voronej, Rusio]

Se neĝos kaj pluvos – ni legadon ĝuos!

internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj

septembro
- oktobro

Konata brazila poetino kaj kantistino Neide Barros Rego rakontas pri sia esperantistiĝo – "Brazila Esperanta Parnaso" - vera poezia trezoro.
Verkoj de niaj legantoj: fikcia rakonto en Esperanto; neelpensitaj historioj.
Diversaj ondoj el bunta mondo: festoj kaj festivaloj, seriozaj kaj amuzaj; tradicioj kaj moroj de etno Setoj.
Gramatika leciono de J-L Tortel – Aforismoj; ŝercoj el "Lernu!"
Praktiko kaj impresoj: Esperanto kaj esperantistoj en lingvaj festivaloj
100-jaraj jubileoj de gravaj eventoj. Korespondu!



Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

- UEA** - Universala Esperanto-Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Rotterdam, Nederlando
- Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910
- Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.
- Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson
St., Redfern N.S.W. 2016
- Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000,
Antwerpen
- Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia
(DF) - BR - 70084-970
- Britio** David Kelso, 5 Craighenhill Road, Carluke, ML8 4QT
- Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvorĥka 1, CZ-696 62 Strĥznice
- Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037,
Beijing
- Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper,
Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.
- Estonio** Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.
- Finnlando** Paivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
- Francio** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Ceri-
saie, 75004, Paris.
- Germanio** Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse,
9 D-55129 Mainz.
- Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada
n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.
- Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184,
TEHRAN
- Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi, 38, 20143, Mi-
lano.
- Italio, Kroatio, Slovenio** Viŝnja Brankoviĉ
Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste
- Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood,
Dublin 6W
- Japanio** Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to,
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3
- Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-
08200, Sabadell
- Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa
11300, Havano
- Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k.
167.
- Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18,
N-0572 Oslo
- Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews,
Christchurch 8004
- Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-
137, PL-01-865 Warszawa
- Portugalio** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto,
N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa
- Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8,
SE-242 35, Horby
- Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH —
4224 Nenzlingen
- Usono** Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El
Cerrito, California 94530, U.S.A.

Multaj asertas, ke aŭtuno estas la plej lirika sezono, kiam agrablas promeni en buntkoloraj parkoj, boskoj kaj arbaretoj kaj pleniĝi tie per kreema inspiro. Ankaŭ bonas en griza tago ĝui hejman varmon kontraste al postfenestra pluvo kaj vento. Estas bone tiumomente komforte sidi en la fotelo kaj legi iun mirindan libron, kiel ekzemple, "Brazila Esperanta Parnaso", en kiu estas kolektitaj la plej elstaraj poemoj de multaj brazilaj poetoj.

Unu el la kompilantoj de "Brazila E-Parnaso" kaj aŭtoro aŭ tradukisto de multaj poemoj en ĝi estas konata brazila poetino, verkistino, kantistino kaj ĝenerale ĉarma virino Naide Barros Rego, kies nomon vi jam renkontis surpaĝe de nia revuo. Ricevinte de Naide donace tiun belan Antologion, ni mem nun ne nur ofte tenas ĝin en siaj manoj, sed citas el ĝi poemojn dum la esperanto-renkontiĝoj, kiujn ni partoprenas aŭ mem organizas, volonte proponas tiun ĉi libron por tralegi al la geamikoj. Hodiaŭ Naide Barros Rego estas gasto de "Kiel tio komenciĝis". Legu la historion de ŝia esperantistiĝo kaj pecetojn de ŝia fajna poezio.

Post belaj verkoj de Naide vi povas legi la prozon, kiun verkis niaj aŭtoroj. Ni ĝojas, ke ili provas siajn fortojn en diversaj beletraj formoj. En "Verkoj de niaj legantoj" vian atenton atendas originala fantazia rakonto de Betty Chatterjee pri aventuroj de romaj tempovojaĝantoj. Mallongaj rakontoj el la reala vivo, kies aŭtoroj estas Ginette Martin, (Francio) kaj Luiza Carol (Israelo) respegulas temon de valoro de honaj interrilatoj, espereble ankaŭ ili vokos vian intereson.

En la vica prigramatika leciono J-L Tortelet lerte kaj sperte klarigas al ni nuancojn de E-gramatiko.

Diversaj festoj, etnaj kaj popolaj festivaloj tra la tuta mondo, kiujn oni festas novembre, estas prezentitaj ĉe "Diversaj ondoj el bunta mondo". Ĉe la sama rubriko troviĝas rakonto de Sergej Paĥomov pri Setoj – malgranda etno, kiu loĝas en Pskova regiono de Rusio. Sur la distra paĝo ĉi-foje ni publikigas elektitajn ŝercojn el konata instrua E-paĝaro "Lemu".

En la rubriko "Praktiko+Impresoj" legu pri lingvaj festivaloj, kiuj nun estas popularaj inter rusia junularo kaj kies iniciatintoj estas esperantistoj.

Ĉi-jare esperantistoj festis 100-jaran jubileon de UEA, sed la antaŭlasta paĝo rakontas pri 100-jaraj jubileoj de ankoraŭ kelkaj monde konataj eventoj.

Agrablan legadon!

la red.

Komencanto

2008 numero 5 // (73) regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Raja Kudrjavceva

adreso: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2009:

internacia tarifo: 18 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: 15 eŭroj;

aerpoŝta aldono 2 eŭroj

konto ĉe UEA: [vkud-a](https://www.komencanto.com)

rusia tarifo: 240 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Neide Barros Rego estas konata brazila poetino, deklamantino kaj kantistino. Estinte diplomita instruistino profesie, ŝi en 1958 fariĝis oficistino de la Ŝtata Deputitejo. Ŝi instruas deklamarton kaj okazigas beletrajn kaj muzikajn eventojn en la kultura centro "Maria Sabina", kiun ŝi mem fondis. En 1994 ŝi ellaboris portugallingve poezian antologion, en 2004 verkis sian unuan poemlibron. Nun Naide apartenas al diversaj beletraj akademioj kaj ricevis plurajn premiojn pro siaj originalaj poemoj, inter ili de UEA en 2005, 2006.

Dankon, doktoro Esperanto

Same kiel Paul Gubbins, mi povas diri, ke ne mi trovis Esperanton, sed Esperanto trovis min. Mi naskiĝis en eta urbo de ŝtato *Minas Gerais*, kies sola lernejo havis nur la kvar unuajn klasojn de la fundamenta kurso.

Pro tio mia familio transloĝiĝis al Niterojo (proksime al Rio), kie mi loĝas ĝis nun. Ĉi tie mi kaj miaj ok gefratoj daŭre studis. Mi fariĝis instruistino kaj ĉeestis kursojn pri administrado.

En 1958, per konkurso, mi fariĝis oficistino de la Ŝtata Deputitejo kaj emeritiĝis en 1989. Diplomite pri deklamado, mi instruas nun tiun arton en la Kultura Centro, kiun mi fondis. Ĝi funkcias en mia domo kaj tie mi ofte okazigas kulturajn eventojn.

Esperanton mi komencis lerni en 1991, sed jam delonge deklamis en tiu lingvo en brazilaj kongresoj kaj renkontiĝoj. Tamen antaŭ ol fariĝi esperantistino, mi partoprenis en la Arta Vespero de la 19-a Brazila Kongreso de Esperanto, en la urbo Rio. Mi deklamis parkere la poemon "La vojo", de Zamenhof. Kia kuraĝo!... La tradukon kaj la prononcon instruis al mi la fervora esperantistino Marlice Botelho.

En 1987 (centjariĝo de Esperanto) mi partoprenis la 23-an Brazilan Kongreson de Esperanto, en la mirinda urbo Rio, en ĝia Ŝtata Universitato. Mi deklamis la faman poemon "Preĝo sub la Verda Standardo", ankaŭ helpite de mia karmemora Marlice Botelho.

Tie mi ekkonis gravajn geesperantistojn el pluraj landoj. Invitita de esperantistoj, sed ankoraŭ ne estinte esperantistino, mi deklamis en pluraj E-eventoj. Kiam iu sin direktis al mi, mi respondis portugale. Kaj ili surpriziĝis, ĉar

mia prononco ŝajnis tre bona. Dum posta solenaĵo mi estis invitita al la podia tablo. La aliaj podianoj salutis la ĉeestantojn en Esperanto, sed mi faris tion portugale. Mi tamen promesis al ili kaj al mi mem tuj eklerni Esperanton.



Mia unua Esperanto-instruisto forpasis kaj kelkaj jaroj poste lia vidvino donacis al mi lian amatan Plenan Ilustritan Vortaron. Mi dankegis ŝin kaj konstante uzis la vortaron. Mia nuna instruisto estas Aloísio Sartorato kaj mia nuna vortaro estas NPIV - Noveldonita PIV.

Mi ĉeestis la universalajn kongresojn en Vieno (1992), Montpeliero (1998) kaj Fortalezo (2002). En ĉiuj tri mi deklamis.

Mi estis premiita en kelkaj beletraj konkursoj pro originalaj poemoj: en Razgrad, Bulgario en 2001, 2002, 2003 kaj 2006. En la Belartaj Konkursoj de UEA en 2005 kaj 2006.

En la fako vidbendo mi ricevis premion pro "Neide Deklamas" (1998). Kaj Sylla Chaves ricevis premion pro "Plurspecaj Eroj por Artaj Vesperoj" (2002) kun mia partopreno kantante kaj deklamante.

Portugallingve, mi publikigis poezian antologion kaj originalan poemlibron.

Mi apartenas al diversaj beletraj akademioj. Inter ili la Beletra Akademio de Ŝtato Rio. Mia parolado tie dum enposteniĝo temis pri Zamenhof kaj la kreado de Esperanto.

En la jaroj 2000/2002 mi partoprenis plurajn programojn de la TV-kurso "Esperantaj Gutoj", de Sylla Chaves.

Mi tradukis la premiitan rakonton "Amo, stranga amo", de Rinaldo Brandão, poste publikigita en diversaj eksterlandaj revuoj; kaj la infanrakonton "La adiaŭo de la armiloj", de Salvador Borges Filho, ilustritan de Miguel Coelho.

Omaĝe al Esperanto, mi verkis la ĉi-suban poemon "Amdeklaro".

Amdeklaro

Mia patrio ne estas
la lando, kie mi naskiĝis,
nek la lando, kie mi loĝas.

Mia patrio
estas la granda mondo
kreita de Dio.

Kaj ni estas gefratoj,
ĉar ni ĉiuj de Li estas gefiloj.

Danke al Zamenhof
ni havas komunan lingvon:
nian amatan Esperanton!...

Kaj ni ankaŭ havas
unusolan flagon:
la verdan standardon
kun la verda stelo de l' espero.

Espero de amo,
de frateco
kaj de paco!

Dankon, d-ro Esperanto daŭrigo

Krome mi muzikigis la poemon "Ho, mia kor'!", de Zamenhof. Ĝi troveblas en Interreto kaj en mia DVD "Neide kantas".

Mi kaj Sylla Chaves pretegis du antologiojn de Esperantaj poemoj verkitaj de 178 brazilaj poetoj, kun iliaj fotoj kaj detalaj biografioj.

Speciala karakterizo de tiuj antologioj estas, ke preskaŭ ĉiuj poemoj inkluzivas batalon por pli bona mondo kaj temas pri paco, kunfratiĝo, protekto de la naturo ktp.

En ili estas multaj tradukoj kaj originaloj niaj. Mia partopreno estis speciale grava pro miaj rilatoj kun poetoj kaj akademianoj tra la tuta Brazilo. Unu el la antologioj estas nur Esperanta; la alia enhavas paralele la portugallingvajn originalojn. Tio donis al ĝi grandegan diskonigon inter gravaj beletristoj de Brazilo.

La apogo de mia edzo, Walmir Ventura Rego, estas gravega. Kun li mi akceptis hejme plurajn eksterlandajn esperantistojn, el kiuj la plej grava estis la nepo de la kreinto de Esperanto, D-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof.


Mi kaj Walmir konstante subtenas kaj laboras por la Esperanto-movado. Nuntempe mi gvidas la kursojn de nia Niteroja Esperanto-Klubo kaj ofte deklamas kaj kantas en Esperanto, dum eventoj al kiuj mi estas invitita aŭ organizitaj de mi.

Baldaŭ mi 70-jariĝos kaj ne scias ĝis kiam mi vivos. Mi volas nur, ke, ĝis la lastaj tagoj, mia vivo estu dediĉita al poezio, deklamado, muziko kaj Esperanto, ka mi vivu batalante por pli bona kaj frateca mondo.

Karaj legantoj! Ĉi tie vi povas konatiĝi kun originale verkitaj kaj tradukitaj poeziaj verkoj de Neide Barros Rego. Ni prenis ilin el bela antologio de brazila poezio, eldonita esperantilingve en 2007 en Rio de Janeiro. La antologio estas frukto de kunlaboro de Neide Barros Rego kun alia monde konata brazila esperantisto Sylla Chaves.

Nepre trovu, mendu, akiru tiun ĉi libron por ĝui mirindan plurstilan poezion de brazilaj aŭtoroj.

Brazila Esperanta Parnaso



enhavas 118 poemojn originale verkitajn Esperante de 35 brazilaj esperantistaj poetoj, kaj 189 poemojn originale verkitajn portugale de 136 aliaj brazilaj poetoj. ... Tiu ĉi poemaro estas plurtema kaj plurstila, sed preskaŭ entute engaĝita en la batalo por pli bona mondo. De ĉiu poeto estas biografio, kaj de la plimulto enestas ankaŭ fotoj.

Protesto

de Neide Barros Rego (MG)

Dum malvarmo kaj malsato
Falĉos homojn sur la stratoj
(por tro multaj mankas hejmo),
mi rifuzos festi.

Dum militoj blinde murdos
kun avido, fanatike
(frato ja mortigas fraton),
mi rifuzos festi.

Dum ekzistos senlaboro,
kaj eĉ analfabeteco
kreskos daŭre kaj minace,
mi rifuzos festi.

Dum prosperos antaŭjuĝoj
pri koloro, kred' aŭ raso
(pro vanteco kaj malamo),
mi rifuzos festi.

Dum prosperos egoismo,
homojn gvidos monavido
al perforto kaj al krimo,
mi rifuzos festi.

Dum infan' kaj maljunulo
restos daŭre sen protekto,
sole, time kaj angore,
mi rifuzos festi.

Sed esperon mi ne perdis
(ĉu frenez' aŭ utopio?):
certe baldaŭ ŝanĝo venos,
kaj mi festos ĝojplene.

Konfliktanta familio

de *Mario Quintana* (RS)
Tradukis **Neide Barros Rego**

Somero estas dika sinjoro
sidanta en balkono,
ŝvitoplene postulante bieron.

Aŭtuno estas maljuna fraŭla onklo,
loĝanta alte, en subtegmento,
kaj ĉiuhore proteste krianta:
“Kial tiu bruoj en la ŝtuparo?”

Vintro estas tremanta aveto,
kun ĉapo enŝovita ĝis l' okuloj
kaj mantelo ĉirkaŭ la mentono,
ĉiam grumblante:
“Mi ne trapasos ĉi tiun aŭguston,
mi ne trapasos ĉi tiun aŭguston...”

Printempo, male,
savas la honoron de la familio:
ŝi estas knabineto ŝnursaltanta
kun haroj blovataj de la vento,
kantante kaj saltante sub la pluvo,
ĝuante la malvarmon de la pluvo,
falanta el la ĉielo,
la suprenirantan odoron de la
grundo,
kaj la frapon de l' vento
sur la malsekan vizaĝon!

Kia ĝojo en la vento distaŭzanta arbojn,
renversanta kompatindajn pluv-ombrolojn
kaj levanta jupojn!
Kia ĝojo en la pluvo kantanta sur vitraĵoj
sub mokridoj de la vento...

Dume,
Defiante la venton, la pluvon, ĉion,
meze de la placo, la knabineto kantas
la ĝojon de la vivo,
la ĝojon de la vivo!

Rodina Marina
[Jurgamiŝ, Rusio]

Oni serĉas feliĉon

de *Zacarias Martins* (PA)
Tradukis **Neide Barros Rego**

Oni serĉas feliĉon
por malfermi la pordojn
de senesperaj koroj.

Oni serĉas feliĉon
por transdoni ĝin senpage
al tiuj, kiuj kredas,
ke eblas ĝin aĉeti
je difinita prezo.

Oni serĉas feliĉon
por dolĉigi lipojn kun amaraj
ridetoj
kaj doni signifon al la vivo.

Oni serĉas feliĉon
por transdoni ĝin ĉefe
al tiuj, kiuj ne plu kredas,
ke ĝi ekzistas.

Oni serĉas feliĉon...
Ne, ne plu serĉu ĝin.
Lasu ĝin fariĝi parto de la
vivo...
Ne kuru for de ĝi.

Tamen, se vi insistas,
ke feliĉo ne ekzistas,
tio tute ne gravas:
klopodu esti feliĉa sen ĝi.



Sublimado

de *Neide Barros Rego* (MG)

Pli facile por mi
estas etendi la manojn ĝis ĉiele
kaj pluki stelon
ol tuŝi vin karese
kaj senti la brilon de viaj okuloj
en miaj.

Pli facile por vi
estas plonĝi en la maran malhelon
kaj el ostro forpreni nigran perlon
ol meti en mian bruston esperon
kaj en mian fingron ringon.

Ne plu interesas al mi
astroj
aŭ ringoj
aŭ perloj
aŭ vi.

Mi elfosis perditajn revojn,
kolektis maltrankvilojn,
kunigis dispecigitajn erojn
de memoro muta
kaj ĉion ŝanĝis en versojn.
Mi kantas ĝis la fino.


“Printempo estas ... knabineto...” (el la poemo de Naide Barros Rego)

Betty Chatterjee [Danio]

Agrabla estas gasto, se ne longe li restas

Diable! Meznokte bruegis ie ekstere. Ĉu okazis ter-tremo? Ĉu finfine eksplodis la tria mondmilito? Ne, verŝajne nur la najbaro, kiu, pro la nokte libera tempo, denove decidis renovigi la domon. Nu, kion fari? Oscedante mi etendis min kaj el-litiĝante mi stumblis ĉe la fenestro por tiri la kurtenojn. Ho, mi anhelis, ĉu mi freneziĝas? Nur koŝmaro, ĉu ne? Ne, tute ne! Ekster la domo en la malhela ĝardeno videblis treege strange, grandega objekto. Jes, objekto mi diris, ne imagebla objekto! Ronda kaj multspika ĝi estis, scintilante, kvazaŭ ĝi estus inkrustita de buntaj juveloj. Malfermante la fenestron, mi ekaŭdis ritman, malagrablan kaj iomete konatan ĉanteton. Tre atente mi aŭskultis, kaj pro subita rememoro, mi rapide refermis la fenestron. Ho ve, estis vera koŝmaro. Tiun ĉi ĉanteton mi feliĉe "enterigis" antaŭ kvindek jaroj, tiun someran tagon kiam mi adiaŭis al la barbulino, kiu post ses jaroj ankoraŭ ne kredis je mia sincera malkapableco pri la latina gramatiko. Ekstere iu, ie ĉanta-

detis:
'Matella, matellae, matellae, matellam, matella, matellae, matella, matellae, matellarum, matellis, matellas.'



En mia mallerta mondeto la vorto noktovazo sufiĉas. Plue, eĉ por la plej delikata komunikado ne mankas al mi tiom da deklinacioj. Tial mi decidis iel ŝtopi la buŝon de tiu ĉi idioto, kiu rompis la noktan pacon. Tetrinkema mi estis, tial venis al mi en la kapon, ke ankaŭ la ĉantulo estas trinkema. Mi malfermis la fenestron kaj laŭte demandis:

'Teon aŭ kafon?'

Morta silento. Tiam io knaris kaj knaris, kaj mi ekvidis rondan breĉon en la objekto, el kiu iu disjetis ŝnurajn eskalon. Post kelkaj sekundoj aperis kruroj sekvataj de postajo, dorso, brakoj kaj kapo, tial mi komprenis ke la vojaĝanto estis homo. Kiam li atingis la teron, mi ekvidis, ke li estas vestita iom asterikse. Turnante sin li marŝis al la domo, tie li tondre frapis je la pordo. Defio estas defio tial mi malfermis la pordon dirante:

'Bonvenon, sed ne tiel bruegu, mi petas!'

'Ho, parolu latinon, mi petas!' postulis la strangulo.

'Tute ne kapablas!'

'Sensencaĵo! Ĉiu parolas latinon. Estas la fundamento de la kulturo de la civilizita mondo, ĉu ne? Latino estas la plej grava internacia lingvo.'

'Ĉu?! Kiu vi estas? De kie vi venas? Kion vi volus?'

'Mi estas Julio. Mi estas tempovojaĝanto el Romo. Unue mi volus tason de teo, sen lakto kaj sen sukero, mi petas.'



Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]

Betty Chatterjee provas sin, verkante en dievsaj ĝenroj. Vi jam legis ŝian intervjuon, ŝian tradukon. Nun legu interesan fikcian rakonton.

'Mi proponis la seĝon al li kaj agaciĝeme diris: 'eksidu!'

'Mi fakte preferus ekkusi sur la kanapon, tiel mi ĉiam faras hejme en Romo.'

'Bona estas Romo, sed tre malproksima de mia domo. Jen la seĝo!'

Li eksidis sur la seĝon kaj mi alportis la teon, kiun li trinkis sen fari daŭrajn komentojn. Tiam mi daŭrigis:

'Kion vi volus kaj kial? Se vi vere devas latine paroli, parolu malrapide kaj klare.'

'Vidu, sinjorino, mi estas lingvestro de la roma lingva akademio, kaj ni bedaŭrinde ofte aŭdis malbonajn onidirojn pri la sorto de la latina lingvo en via nuntempa malgaja mondo. Pro tio mi estas ĉi tie. Mi havas la gravan respondecon memorigi al la homaro pri nia sankta lingvo.'

'Sankta lingvo. Ĉio malgraŭ ĉio, memoru - ni venis, ni vidis, ni konkeris, tial ekde tiam nia lingvo jam rajtas mastri la mondon. Mi ne volus kritiki la ekleziajn kialojn por la reformacio, sed mi nur konstatas, ke poste malaperis la internacia interkompreno.'

'Kia sensencaĵo! Antaŭ la reformacio nur la klerikaro kaj la lertularo komprenis latinan, kaj vi tute forgesis la popolojn ekster Eŭropo. Ĉu vi vere ne aŭdis la onidirojn pri la nuntempa sankta lingvo, kiun ĉiu devas lerni - la angla?'

'Neniam.'

'Ho ve! La angla estas tiel malfacile lernebla kaj maldemokratia kiel la latina, kvankam la malfacilaĵoj estas malsimilaj. Laŭ mia opinio, ĉiuj devas lerni Esp...'

'Interese sinjorino, tamen mi ne estas sola, la edzino kaj la gefiloj dormas en la tempoveturilo, kaj iom post iom ankaŭ mi estas dormema. Pli poste mi volonte revenos kun la tuta familio por matenmanĝi. Ĝis baldaŭ!'

'Ĉu vere?'. Sed tion li ne aŭdis. Je la kvara kaj kvarono mi finfine ekdormis.

Je la oka kaj kvarono la praromano plenumis sian promeson. La tuta familio: la edzo, la edzino Minerva kaj la sesjaraĝaj ĝemelaj gefiloj Juĉjo kaj Minjo, ĉiuj malfortaj pro la malsato, sturmeniris la domon, eksidis ĉe la tablo kaj manĝadegis. La saĝulo, kiu iam diris ke, malsata stomako oreton ne havas, tute pravis. Kiaj manĝegemuloj!

Obstine mi klopodis ĝentile interparoli kun ili, sed tuŝis ilin, kiel akvo anseron. Kaj per roma maniero ili disĵetis la ovajn ŝelojn ktp sur la plankon. Tamen finfine la patro ruk-tante postulis, ke la infanoj iru for por trovi kunludantojn.

‘Ho, antaŭe, bonvolu meti la manĝilaron en la kuirejon!’ - mi postulis.

‘Kial? Kie estas via sklavino?’

‘Sklavino? Bonege, mi konatigu al vi la sklavinon! Sekvu min, sed ne forgesu kunporti la manĝilaron.’

Ambaŭ infanoj sekvis min al la kuirejo, kie ili rapide lernis meti la aĵojn en la manĝilar-lavmaŝinon. La afero ŝajnas al ili treege amuza ĝis tiam, kiam Minjo hazarde ŝaltis la maŝinon, kaj pro la stranga bruego kaj vibrado la infanoj kriĉe rekuris al la gepatroj.

‘Ne gravas! Iru for! Trovu kunludantojn! Ni bezonas trankvilecon por paroli pri gravaj aferoj.’

Sur la strato estis grupo da sci-volemaj infanoj, kiuj ekvidinte la ‘objekton’ en la ĝardeno, volus skrutinii ĝin. Kiam Juĉjo kaj Minjo eliris el la domo, la infanaro kriegis:

‘Antaŭ du semajnoj okazis la karnavalo! Kial vi estas masko-vestitaj?’

‘Ni ĉiutage vestas nin, ni ĵus venis per tempoveturilo el antikva Romo!’ replikis Juĉjo.

‘Nu, nu, kia mensogulo!..... Ĉu vi volus vidi mian novan biciklon?’ demandis knabo.

‘Biciklo, kio estas tio? Kie ĝi estas?’

‘Hm, fojnkapulo! Biciklo estas rapidega veturilo, kiu havas du radojn, du pedalojn kaj selon. La mia estas en mia ĝardeno, venu vidi ĝin!’

‘Tuj! Ĝis la, Minjo!’

Tiel malaperis Juĉjo. Kvin minutojn pli poste okazis bruego, kiu nur signifis la ekon de la unua leciono pri la biciklado.

Minjo intertempe feliĉe ludis per globetoj kun samaĝa knabineto ĝis ekpluvis, tiam la knabineto Sonjo kaptis ŝian manon kaj ili enkuris ŝian domon. En la salono, manĝante krakmaizon, kuŝis la patrino de

Sonjo sur la sofo. Ŝi tute ne komprenis la infanojn, kaj ŝajnis al Minjo, ke ŝi pie kultis la domajn gediojn, kiuj vigle agadis kaj laŭtege predikis malantaŭ iu fenestro sur la muro.

‘Ni silentu, ĉar panjo spektas la Doktoron Fil’. Venu! Ni ludos en mia ĉambro.’

Sekvante ŝin en la ĉambreton, Minjo treege stuporis pro la amaso da ludiloj, libroj kaj vestaĵoj, kiuj sternis la plankon kaj la liton. En la angulo de la ĉambro Minjo vidis alian altaron, kiu similis al tiu ĉi en la salono.

‘Ho, kie estas ties gedioj? Ĉu ili estis for?’

Sonjo grimpis sur la liton kaj disĵetante plurajn aĵojn sur la plankon demandis al Minjo:

‘Ĉu vi volus spekti filmon?’

Sen atendi la respondon, Sonjo ekkaptis la telekomandilon kaj ŝaltis la ‘altaron’. La gedioj tuj hejmen revenis. Tre plaĉis al Minjo la Disneja Spektaklo.

Intertempe mi montris al la gepatroj alian specon de doma sklavino – la polvosuĉilon. La ovaj ŝeloj, kiujn ili antaŭe disĵetis sur la plankon ne plaĉis al mi. Mi unue postulis al Julio, ke li “polvosuĉu” la salonon, sed li paŭte rifuzis. Aliflanke Minerva, kiu estis tuj imponita, purigis la tutan domon. Poste ŝi konfesis al mi, ke ŝi volus aĉeti tiun ĉi mirindaĵon, ĉar iom post iom la doma sklavino iĝas treege impertinenta. Intertempe Julio malkovris la televidilon kaj la telekomandilon.

‘Kia bela distraĵo, tiu ĉi estis tiel interesa kiel la cirko hejme en Romo. Kaj la seĝo estas pli komforta!’

Oni ne suferas pro pluvo kaj blovo kaj oni evitas la odoraĵojn de la bestoj kaj sklavo, ĉu ne?

Mi tute ne komprenas la lingvon, sed ili sangavide batelegas tiel bone kiel niaj uloj’

‘Ĉu vere, kara?’ kriegis Minerva, kiu do sensukcese klopodis ekkapti la telekomandon.

Post horo de akra disputo ili rezignis la batalon, kiam mi proponis al ili, ke ni ekskursu en la urbegon. Ŝajnis ke la infanoj ĝojis la ludadon ĉe la novaj geamikoj, tial ni sole forveturis per buso. Ili kutimis veturi per privata ĉaro, tial komence ili timis pro la rapideco kaj la bruego. Pro la romaj vestaĵoj aliaj vojaĝantoj scivole fiksrigardis ilin. Solidkorpa junulo, kiu estis vestita per ĉemizo, sur kiu estis angle skribita ruĝa slogano - ‘vodko unuigas la mondon’, klopodis angle babili kun ili, sed Julio nur graŭlis:

‘Do, latine parolu!’


‘Reklamoj por la filmo ‘Mi estas Klaŭdio, ĉu ne?’

‘La latinan paroladon mi postulis!’

‘Eksmodulo! Parolu anglan aŭ.....!’

‘Ni eliru!’ Mi interrompis lin.

Kompreneble mi devus daŭre rakonti pri la aventuroj de la romaj tempovojaĝantoj, sed la tempo fakte mankas al mi. Tamen mi finfine konfidencas al vi, ke antaŭ ilia hejmenvojaĝo mi donis al ili du librojn: ‘La Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto’ kaj ‘Asteriks ĉe la Olimpikaj Ludoj’. Nur pensu, se la praromanoj komprenus la signifon de Esperanto, tiu estus la kurtvojo al Utopio. Se tia freneza ruzo sukcesus, la direkto de historio feliĉe ŝanĝiĝus, ĉu ne?



Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]

Neelpensitaj historioj

Ginette Martin
[Soulxures/Moselotte, Francio]

Eĉ handikapulo povas helpi.

En la lastaj jaroj de sia vivo mia patro perdis siajn mensajn kapablojn.

Li ne plu kapablis memstare manĝi, nek vesti sin, nek lavi sin. Li bezonis helpon por ĉiu ago de la ĉiutaga vivo.

Mia patrino kaj mia fratino, ankaŭ pli poste dom-helpantino alterne zorgis pri li. Li estis kvazaŭ infano. En tiu periodo, mi estis aktiva instruistino, kaj kiam mi vizitis ĉiutage mian familion, ofte mi estis tre laca post la fino de mia labor-tago. Tiam mi sidis apud mia patro sur la kanapo kaj rigardis, kion li faris. Strange, li havis paper-pecetojn en la manoj kaj senfine rulis ilin inter la fingroj. Al kio helpis tiuj gestoj?

Certe, en sia penso, li laboris. Mi pensis pri lia antaŭa metio, kiu estis farbi domojn kaj glui tapetojn ĉe la murojn, eble li preparis paperojn antaŭ la gluado. Sed mirakle, tiu ŝajna laboro de mia patro efikis sur min. Kiam mi rigardis lin, farantan tiujn aŭtomatajn gestojn, subite kvazaŭ magie mi endormiĝis kaj sentis min tute ripozita kaj ne plu laca.

Jes, mia patro faris magion. Mi certas, ke li faris pozitivan magion, eble por mi sola.

Luiza Carol [Israelo]

Nekaptita vivo

"Ŝajnon ne fidu, juĝi ne rapidu."

Mi konis maljunulon, kiu neniam edziĝis kaj neniam havis gefilojn. Li vivis tute sola, eĉ sen kato aŭ hundo, malgraŭ tio, ke li tre ŝatis dombestojn. Li ankaŭ ŝatis infanojn, kaj tial li fariĝis instruisto. Muzikon li instruis, kaj li estis bona instruisto.

Foje, mi demandis lin, kial li ne provas edziĝi, por ke li ne plu estu sola, almenaŭ ĉe la fino de la vivo. Li respondis, ke li timas pri la kaptiloj de amo. Li ĉiam timis pri tiuj, kaj tial li neniam edziĝis. "Ŝajnon ne fidu, juĝi ne rapidu!" - li kutimis diri. Dum la junaĝo, li timis ke beleco povus esti kaptilo, inteligenco, talento, boneco povus esti kaptiloj... kaj li evitis belajn, inteligentajn, talentajn, bonajn virinojn. Ĉar la aliaj ne allogis lin, li restis sola.

Foje, mi demandis lin, kial li ne adoptis orfan infanon. Li respondis, ke li pripensis la aferon,

sed decidis, ke tiu estus ege danĝera. Li opiniis, ke ankaŭ rilate al infanadopto, oni povus renkonti kaptilojn de amo. Ekzemple, li timis, ke la adoptita infano kreskos kaj poste forlasos lin, kaj tiel li restos sola dum la maljunaĝo.


"Sed ĉiukaze vi ja estas sola" - mi diris al li.

"Jes", - li respondis, - "Sed almenaŭ mi ne suferas kaŭze de la kaptiloj de amo."

Foje, mi demandis lin, kial li ne adoptas orfan katon aŭ hundon. Lia respondo estis la sama: li timis pri kaptiloj de amo. Li timis, ke li tiom multe amus katon aŭ hundon, ke li ne povus elteni la penson, ke ĝia vivo estas pli mallonga ol homa vivo. Li preferis ne havi dombeston, anstataŭ suferegi pro ĝia morto.

Tiu stranga homo vivis sola kaj malfeliĉa ĝis la fino de sia vivo, ĉiam dirante: "Ŝajnon ne fidu, juĝi ne rapidu."

Ĉu li vere sukcesis vivi "nekaptitan" vivon?




Spartak Tjulajov [Jakutio, Rusio]

Karaj legantoj! Espereble vi atendas aperon de prigramatikaj lecionoj de J-L Tortel. Tiam la vica ĝojigos vin!

Johan' Luko Tortel [Le Belvedere, Francio]

Babilado 20



Saluton, karaj gekomencantoj !

Ĉu Esperanto estas facila? malfacila? Jen kelkaj ekzemploj por decidiĝi pri la afero:

Por hundon dronigi, oni nomas ĝin rabia (2027)

Oni nomas ĝin: subjekto *oni*, verbo *nomas*, objekto (aŭ rekta komplemento) *ĝin*. Bone; sed kial *rabia* sen fina -N ? *Rabia* ne apartenas al la subjekto *oni*; do?

Rabia rilatas al la objekto *ĝin*, sed en tute speciala maniero; ĝi **atribuas** (ĝi donas) econ, karakterizaĵon, al la objekto. Tiam por distingi tiun apartan rolon oni ne post-metas -N.

Oni tradicie diras, ke tiu "sen-N-a" apud-meto estas **predikativo**, iom kompleksa vorto. Oni rajtas preferi diri, kiel Bertil Wennergren en sia Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, ke ĝi estas **perverba priskribo de objekto**, kio avantaĝe klarigas la aferon.

Alia ekzemplo:

Kia oni vin vidas, tia oni vin taksas (859)
(Oni juĝas laŭ aspekto)

Kia kaj *tia* **perverbe priskribe** rilatas al *vin*, ne havante -N.

En sia Plena Analiza Gramatiko de Esperanto Kalocsay kaj Waringhien insistas pri tiu manko de -N, kiu signas por la orelo la apartecon de tiu indiko: " ...*la manko de la -N ludas rolon tiel gravan, kiel robus la ĉeesto de speciala finaĵo aŭ prepozicio.*"

Tia sen-N-a predikativo jam aperas en nia Fundamento:

ŝi nomis ŝin sia _filino_ (§ 17 de la Ekzercaro).

Ni rimarku, ke tio iom ŝanĝas la sencon de la verbo:

Ili rigardas min honesta _ = Ili konsideras min (kaj ne simple direktas la okulojn al mi);

Mi trovis la vinon bonan = Mi esploris la kelon kaj fine malantaŭ forgesitaĵoj trovis botelon da espereble bongusta vino;

Mi trovis la vinon bona _ = Mi malfermis la botelon kaj gustume juĝis, ke la vino estas bona (mi *juĝis*, kaj ne *esploris*).

Oni elektis lin prezidanto = Oni levis lin, ordinarulon, al la pozicio de prezidanto;

Oni elektis lin prezidanton = Oni decidis, ke li, jam prezidanto, promenados, staros antaŭ fotisto, partoprenos en bankedo, ktp.

Kelkaj asertas, ke Goya unue pentris *La Maja vestida*, kaj ke nur poste li pentris ŝin sen ŝiaj vestoj (*La Maja desnuda*) nur imagante ŝian nudecon el la unua bildo (ĉar laŭ tiuj opinioj la membraj proporcioj ne estas kontentigaj, kun tro dikaj antaŭbrakoj kontraste kun la gamboj). Multaj aliaj diras, ke tio estas stultajo, kaj ke li rekte pentris ŝin sen ŝiaj vestoj.

Nu, se ni diras : "Li pentris ŝin nudan", tio signifas, ke ŝi nude pozis, ke ni insistas pri ŝia tiama nudeco kaj ke pravas la dua opinio; se ni diras: "Li pentris ŝin nuda", tio signifas, ke li bilde prezentis ŝin nuda, ke li montris ŝin nuda, ke la rezulto estas pentraĵo de nuda virino, sed fakte ni ne scias, ĉu ŝi vere estis nuda dum la pozado, kaj eble pravas la unua opinio.

Niaj du cititaj gramatikoj ankaŭ donas bonegan ekzemplon per farbado de domo; jen:

Ni farbas nian domon flavan = ni farbas nian domon, kiu jam estas flava; sed al kiu nova koloro? Ne eblas scii; eble denove flava, eble alia.

Ni farbas nian domon flava = ni farbas nian domon per flava koloro; ĝi poste estos flava; sed ĝian antaŭan koloron oni ne konas.

Ni komence starigis la demandon: ĉu facila aŭ malfacila estas nia Esperanto ? Nek unu, nek alia. Sed Nova Plena Ilustrita Vortaro respondas por ni per *Subtil/a*:

Subtil/a = kapabla fari aŭ rimarki delikatajn nuancojn, diferencojn.

Ĝis la venonta fojo!
Johan-Luko

Ĉu iu supozis, ke nur dum unu monato en diversaj lokoj de la mondo okazas tiom variaj kaj neordinaraj festoj kaj festivaloj?! Tiun ĉi materialon esperantigis kaj sendis kiel sia kontribuo por la rubriko

Prokofjev Dmitrij [Ĉaŝi, Rusio]

Festoj

tradiciaj kaj netradiciaj en novembro-decembro tra la tuta mondo

Festo de ĉokolado

10-12 nov. Nov-Jorko, Usono

Tiu aranĝo estas dediĉata ekskluzive al ĉokolado, ekde la preparo ĝis gustumado, de produktantoj kaj fakuloj de ĉokolada arto, kiuj ĝoje malkovras al la vizitantoj sekretojn de siaj receptoj.

Ĉokoladaj fakuloj rakontas pri historio de ĉokolado, "ĉokolada" stilo kaj "etiketo" kaj kompreneble, proponas gustumi siajn ĉokoladajn kreaĵojn.

Festo de la vino "Bojole nuvo"

15 nov. Tarar, Francio


Kun torĉoj el vinberaj branĉoj la vinfarantoj venas al la ĉefa urba placo, kie ĝuste meznokte elbatas korkojn el la vinbareloj kaj plenigas la kruĉojn per ŝprucoj de juna vino.

En la sama tempo vendado de "Bojole nuvo" startas en restoracioj de Parizo, Londono, Liono, Dijono kaj en multaj aliaj urboj de Francio.

Tago de Sankta Kristobala

16 nov. Havano, Kubo

Post la nomo Sankta Kristobala kaŝiĝas mar-vojaĝanto, kiu malkovris Amerikon - Kristofor Kolumb. En la tago de Sankta Kristobalo (ĉiela protektanto de Havano), plej granda parto de la urbaj loĝantoj venas al la katedralo El-Templete kaj klopodas tri-foje ĉirkaŭiri la sanktan arbon. Samtempe oni enpensas iun deziron, kiu devas nepre plenumiĝi.



Festivalo de Olivoj

14-20 nov. Bazna, Hispanio

Olivoleo estas la bazo de andaluza kuirado, kaj Bazna estas hispana ĉefurbo de olivoj. La festivalo estas dediĉata al finiĝo de nova rikolto en olivarbaj boskoj.

Dum la festivalo oni povas gustumi diversajn pladojn el olivoj, kaj konatiĝi kun produktado de oliva oleo, kaj, kompreneble, gustumi la plej bonajn specojn.

Semajno

de bongusta kaj sana manĝaĵo

16-18 nov. Londono, Britio

La ĉefa ideo de la festo – *sano povas esti bongusta kaj la bongustaĵoj – sanaj*. Sub tiu slogano pasas multnombraj ekspozicioj, konkursoj de profesiaj kuiristoj ĉe BBC – *Good Food Show*. Dum la tuta semajno ĉio estas bongusta, utila kaj spektinda: la plej bonaj kuiristoj de la mondo kuiras kaj vizitantoj – rigardas kaj manĝas.

Konkurso de mensoguloj

20 nov. Wosdeil, Britio

Ĉiujare en Wosdeil kolektiĝas modernaj mensoguloj por difini, kiu el ili povas plej lerte prezenti malveron kiel vero. Ĉiu partoprenanto ricevas po kvin minutoj por prezenti sian neordinaran mensogaĵon. Uzi iujn helpajn ilioj estas malpermesata.

Festivalo de elefantoj

17 nov. Surin, Tailando

Pli ol 200 la plej lertaj kaj cerbum-kapablaj elefantoj kolektiĝas por demonstri al ĉiuj siajn kapablojn. Tre simpatie aspektas komuna marŝado kune kun grandaj elefantoj de etaj elefantidoj. La elefantoj ludas pilkon, prenas de la tero malgrandajn objektojn (alumetajn skatolojn ktp) per rostroj kaj plenumas diversajn ordonojn.

Naskiĝfesto de Avo-frostoj

18 nov. Velikij Ustjug, Rusio

Tiu festo okazas ĉe la naskiĝurbo de Avo-Frostoj en norda urbo Velikij Ustjug. En tiun tagon oni organizas leterkestojn, per kiu oni povas sendi leterojn al Avo-Frostoj. Tiujn leterkestojn plezure uzas kaj la lokaj infanoj kaj turistoj. Gratuli la fabelan naskiĝinton venas liaj kolegoj: Santa Klaus el Finnlando, Ĉiŝan – el Jakutio, Pakkajne el Karelio, vintra fabela Mikilaŝ el Ĉeĥio, Neĝulino el rusia urbo Kostroma.

Festivalo Marjaĉi

22 nov. Meksikurbo, Meksiko

Tio estas tradicia festo de meksikaj muzikistoj – *marjaĉi*. Ĉiujare la muzikistoj kolektiĝas en la tago de sia protektantino - Sankta Sesilia. La plej ŝatata loko estas placo de Garibaldi

Tutmonda tago de Necesejoj


19 nov. Singapuro

La festo estis proklamita en 2001 dum tutmonda konferenco en Singapuro kaj estas dediĉata al la problemoj de necesejoj. La loko de la konferenco estis elektita ne ŝajne: Singapuro estas fama pro ideala pureco de necesejoj. Tiam al Singapuro kunvenis pli ol 200 delegitoj, kiuj fondis Tutmondan Necesejan Organizaĵon.

Kristnaska festo de ĉevaloj

26-30 dec. Mehelen, Belgio

Tiuj ĉevalaj konkuroj okazas en Mehelen ekde 1980. Al la festo venas ĉirkaŭ 100000 da spektantoj. En la konkuroj partoprenas ĉevalrajdantoj de ĉiuj niveloj kaj la programo kompiliĝas el tradiciaj programeroj kaj originalaj prezentaĵoj.



Bildoj sur la paĝoj de Luiza Izmaĵova [Kuzneck, Rusio]

Sergej Paĥomov [Kirov, Rusio]

Tradicioj kaj moroj de etno Setoj

En Pskova regiono de Rusio fine de aŭgusto tradicie okazas Internacia Etno-kultura Festivalo de la etno "Setoj" (en Esperanto estu Setoj - S.P.). En vilaĝo Sigovo ili loĝas jam multajn jarcentojn. Ili ĝis nun konservas antikvajn morojn, ĉiujare elektas reĝon kaj por la festo vestas sin en kostumojn, pri kiuj enviis ĉiu historia muzeo.

Komence de la prezentado unu el homoj ek-kantas kaj aliaj subtenas la kantadon, tiel ili kantas "lelo"-n, la popolan kanton. Kiu scipovas danci, tiu dancas, oni ŝercas unu pri la alia, fakte ja por tio ĉi ekzistas la festo "Kermyŝ".

La etno setoj estas indiĝenaj loĝantoj en Pskova regiono, ili apartenas al finna-ugra lingva familio, parolas en sud-estona dialekto. Sed historie okazis tiel, ke setoj pli multe rilatis kun slavoj. Tial la moroj kaj tradicioj multe interplektiĝas kun la rusaj, kaj laŭ religio ili estas rus-ortodoksaj kristanoj (parencaj estonoj estas luteranoj - S.P.).

Ena Lyjĥ preĝas antaŭ komenco de ĉiu afero, por la festo ŝi vestas sin en avinan robon, kiu estas jam 100-jara. Aĝa virino, sed kvazaŭ infano fanfaronas pri omamaĵoj sur manikoj! Kiam la robo pretas por la festo, Ena provludas sian festan rolon kune kun filino Julia. Ŝi estas 21-jara, ŝia patro estas ruso, sed la fraŭlino libere parolas en sia rara seta lingvo. Ŝia patrino Ena scipovas la rusan, la estonan kaj la setan. Ena Lyjĥ: "Ni parolas tre rapide, ankaŭ en niaj manoj ĉio "brulas" (tio signifas ke ili rapide kaj lerte ĉion faras - P.S.), ni estas gastamaj, se iu homo perdas la vojon, ni montrons al la homo la ĝustan vojon, eĉ akompanos lin."

Multaj virinoj preparis por la festo ne nur avinajn robojn, sed ankaŭ omamaĵojn el arĝento, la plej valorajn. Ju pli riĉa estas familio, des pli multe da arĝentaj moneroj kaj ĉenoj portas la familianoj. Pri plenumado de tradicioj kaj moroj observas la reĝo de setoj, kiun oni reelektas ĉiujare per malferma voĉdonado. La reĝo ne havas kronon, sed havas nur la devon.

Silver Hjuncy, la reĝo de setoj diras, ke: "Oni kantu, dancu kaj muziko ludu". En la festivalo "seto-ma" kio signifas: la tero (aŭ Patrujo) de setoj ĉeestas ĉiuj reprezentantoj de la etno, loĝantaj en Rusio. Multaj delonge konas unu la alian, tial la feston ili nomas la familia. Entute en la mondo estas kelkaj miloj da setoj, iu parto el ili loĝas en Estonio. Ekzemple *Leo Mjurkin* venis el estona ĉefurbo Talino. Ĉi tie li havas parencojn. Li ludas per nacia muzikilo siajn ŝatatajn melodiojn. Rusajn tradiciojn setoj ŝanĝis laŭ sia vidpunkto. Ekzemple iujn rusajn manĝaĵojn ili kuiras iomete alie. En urbo Pskovo estas Pskova-Peĉora monaĥejo, tie kuŝas restaĵoj de sanktulo Karniil. Li estis unua kiu baptis la setojn al kristana, rus-ortodoksa religio.

Do sciu, ke en Kaŭkazo estas etno osetoj, sed multe pli norden ekzistas etno setoj.

Aforismoj, anekdotoj, humuraĵoj...



kollektis kaj esperantigis Andrej Naumov [Novoaltajsk, Rusio]

Se mi volas aŭdi ion saĝan — mi komencas paroli

Nesufiĉan profundecon de la penso oni kutime kompensas per ĝia longeco.

*

Nenio alia plifortigas kredon je homo, kiel antaŭpago.

*

Trovi sian lokon en la vivo estas multe pli facile, ol ĝin okupi.

*

Nenio tiom forte malplaĉas al virinoj en ekstera aspekto de viroj, kiel manko de mono.

*

Ju malpli multe oni pensas, des pli multe havas samopinianojn.

*

Homoj eksciis naĝi kiel fiŝoj, flugi kiel birdoj. Restis nun nur ekscii vivi, kiel homoj.

*

En sia praktiko kuracistoj foj-foje frontas la okazaĵojn, en kiuj kapdoloro malaperas tuj post demeto de la edziĝ-ringo.

*

Se al vi ne plaĉas via salajro — fordonu ĝin al la edzino!

*

Se vi iam trovos vian feliĉon, vi eble miros, simile al avino, kiu trovas la serĉatan okulvitron sur sia nazo, ke via feliĉo estis ĉiam tute apude.

Optimisto estas homo, kiu kontraŭ lasta mono aĉetas monujon.

Novembro estas unu el la plej danĝeraj monatoj por ludi en borso. Aliaj danĝeraj monatoj estas: julio, januaro, septembro, oktobro, aprilo, majo, marto, decembro, aŭgusto kaj februaro.

Mi sekvas la regulon — neniam fumi pli ol unu cigaredon samtempe.

Laŭ Mark Tven

=====

Se tio, kion vi volas diri ne pli belas, ol silento — ne diru.

La infanojn interesas demando: "De kie ĉio aperis?", la gepatrojn — "Kien ĉio malaperas?"



la bildojn sendis Andrej Naumov [Novoaltajsk, Rusio]

Vizitante paĝaron de www.lernu.net vi povas trovi ne nur lecionojn por lerni, sed ankaŭ anekdotojn por plibonigi la humoron.

Anekdotoj el



Ruĝĉapulino alvenis al la avino kiu, kovrita ĝis la mentono, ankoraŭ dormis en la lito.

- Avinjo, kial vi kuŝas antaŭtagmeze en la lito?

- Mi estas laca, nepineto mia.

- Kaj kial viaj okuloj estas tiom ruĝaj?

- Ĉar mi komputilumis la tutan nokton.

*

Edzino, foliumante modo-revuon, diras al la edzo:

- Ĉi-jare viroj portados ĉemizojn sen butonoj.

- Mirinde, - ekkriis la edzo. - Sekve mi jam 15 jarojn vestas min laŭ la lasta modo.

*

Viro ekvidis belulinon kaj diris:

- Kiel belega vi estas!

Kaj ŝi respondis:

- Dankon! Sed bedaŭrinde mi ne povas diri la samon al vi...

- Nu, faru kiel mi, ne diru la veron!!!

*

Juĝisto diras al atestanto:

- Do, vi vidis, kiel tiuj du interbatiĝis per seĝoj. Kial vi ne penis trankviligi ilin?

- Mankis la tria seĝo, sinjoro juĝisto.

*

Dum la geografia leciono, la instruistino demandas:

- Joĉjo, donu al mi tri asertojn, kiuj pruvas, ke la Tero estas ronda.

Post ioma cerbumado, li respondas:

- Bone, la libro diras ke ĝi estas tia, mia patro diras ke ĝi estas tia, kaj la najbarino diras la samon, ankaŭ vi diras, ke ĝi estas tia, do - tio sufiĉas.

Distriĝema profesoro sur herbejo interpuŝiĝis kun bovino. Li demetis la ĉapelon kaj ekmurmuris:

- Pardonu, sinjorino.

Kaj tuj poste li ekvidis, ke tio estis bovino. Post nelonge sur herbeja vojeto li tuŝis fraŭlinon kaj ne levinte okulojn ekkriis:

- Kaj ree vi baris la vojton, aĉa besto.

*

En medicina fakultato okazas ekzameno.

- Kion vi rekomendos, por ke la paciento ŝvitu?

- Varmegan teon, sinjoro profesoro.

- Kaj se ĝi ne efikos?

- Aspirinon.

- Se ankaŭ ĝi ne helpas?

- Amidopirinon.

- Kaj se tio senrezultos?

- Tiam mi sendos lin al via ekzameno, sinjoro profesoro.

*

- Mi bezonas laboron kaj urĝe! Mi havas edzinon kaj kvin infanojn!

- Tre bone. Sed kion vi ankoraŭ povas fari?

*

Nepo demandas sian avinon, kiu venis por gastigi:

- Avinjo, sur kio vi dormas hejme?

- Sur sofo-lito, nepoĉjo.

- Sed kial vi mensogas?

- Mi diris la veron.

- Kaj la patro diris, ke vi dormas sur sako da mono.

Oni scias, ke fama fizikisto Albert Ejnŝtejn elmigris al Usono. Li komencis labori en universitato, kie li estis alte taksata. Lutage, kunlaboranto renkontis lin surstrate kaj demandis:

- Majstro, kial vi, tiom alte taksata homo, portas tian malnovan kaj malbelan mantelon?

- Eĥ, ne gravas, ja neniu konas min ĉi tie.

Pasis jaroj... La sama kunlaboranto renkontas Ejnŝtejnnon, vestitan per la sama malnova mantelo:

- Majstro, kial vi, tiom alte taksata homo, portas tian malnovan kaj malbelan mantelon?

- Eĥ, ne gravas, ja ĉiuj konas min ĉi tie.

*

- Paĉjo, kiam mi kreskos, mi laboros ĉe la Norda poluso.

- Bone.

- Sed mi devas min prepari por tio. Ĉu ne?

- Jes. Kiamaniere?

- Ĉiutage vi devas aĉeti glaciaĵon por mi.

*

- Ĉu vi tralegis mian verkon?

- Jes, eĉ dufoje.

- Dankon. Ĉu efektive?

- Vere, ĉar je la unua fojo mi nenion komprenis.

*



Osipova Arina [Jekaterinburg, Rusio]

Esperantistoj organizas lingvajn festivalojn

En Rusio nun inter junularo estas popularaj lingvaj festivaloj, ĉar gejunulojn interesas diversaj lingvoj kaj kulturoj de diversaj popoloj. Ĝenerale ellerni iun ajn lingvon signifas ne nur posedi la lingvon mem, sed ankaŭ koni la landon, kie ĝi estas vaste uzbla kaj scii pri tradicioj kaj kulturo de tiu lando. Sed esperantistoj devas orientiĝi en la tuta mondo, ĉar nia lingvo havas pecetojn el multaj lingvoj, kaj internacia kulturo, kvazaŭ bunta mozaiko, konsistas el multaj tradiciaj eroj de diversaj popoloj kaj landoj. Certe en la mondo estas pli multe da popoloj kaj lingvoj, uzataj de ili, ol tagoj en la jaro. Do, kiom da tempo ni ĉiuj bezonus por ekscii pri ĉiuj lingvoj kaj tradicioj? Ĉu eble kelkajn jarojn aŭ eble la tutan vivon?

Rusiaj esperantistoj provis solvi la problemon kaj iniciatis ĉiujarajn aranĝojn, kiujn ili nomis "lingvaj festivaloj". La unuan lingvan festivalon faris antaŭ 13 jaroj ĉuvaŝaj esperantistoj el universitato de ĉefurbo de Ĉuvaŝio – Ĉeboksaro. La festivalo estis sukcesa – ekscii pri la lingva riĉeco de la

Tero venis ne nur ĉeboksaraj esperantistoj, sed ankaŭ esperantistoj el diversaj urboj de Rusio kaj, kio gravas, ekstera publiko de la urbo. De jaro al jaro kreskas la kvanto de prezentataj lingvoj, la organiza teamo ĉiufoje aldonas ion novan kaj freŝan, kiu kaŭzas la intereson de la partoprenantoj.

Mi mem 2-foje vizitis ĉeboksarajn lingvajn festivalojn, veninte el malproksima Uralo. Nekomparante vizititajn du aranĝojn, mi simple volas priskribi ĝeneralan strukturon de lingva festivalo. Dum solena malfermo, kiu okazas la unuan tagon de la festivalo en granda halo, post salutvortoj kaj deklaro de festivalaj celoj, antaŭ la publiko elpaŝas reprezentantoj de ĉiuj lingvoj, kiujn la festivalo planas prezenti. Ili reklamas sin kaj invitas ĉeestantojn viziti salonon, kie okazas la prezentado de tiu aŭ alia lingvo. Elektinte, kien iri (ja paralele okazas kelkaj prezentadoj en kelkaj salonoj) vi vizitas iun salonon, partoprenas lecionon de iu lingvo, povas aŭdi, kiel ĝi sonas, ricevi elementajn sciojn pri ĝia gramatiko, provi eldiri kelkajn vaste uzatajn vortojn en tiu lingvo


kaj spekti aŭ eĉ partopreni iun pri-kulturan prezenton. Tre rapide pasas kvardek kvin minutoj, dum kiu daŭras la leciono. Post nelonga kaf- aŭ te-paŭzo vi havos eblecon viziti ankoraŭ du-tri prezentadojn jam de aliaj lingvoj. Fine de la dua tago de la festivalo kutime okazas komuna gaja koncerto kun partopreno de ĉiuj lingvorepresentantoj.

Krom tio, ke esperantistoj ĉiam estas organizantoj de similaj festivaloj, ili certe vaste reklamas kaj interese prezentas nian Esperanton kaj mi devas rimarki, ke salono, kie estas prezentata la internacia lingvo, ĉiam estas aktive vizitata. Kutime dum la prezento de Esperanto oni invitas ĉeestantojn veni al la Esperanto-kurso kaj ellerni la lingvon pli profunde. Do, eblas diri, ke lingva festivalo plenumas ankaŭ rolon reklaman.

Post la ĉeboksaraj, similajn lingvajn festivalojn komencis organizi gejunuloj en aliaj rusiaj urboj. Ĉiuj diversurbaj festivaloj havas siajn proprajn individuajn trajtojn, sed ilin kunigas la komuna celo: eduki amikecon kaj toleremon inter ĉiuj popoloj. Nun ekzistas tradiciaj lingvaj festivaloj en Moskvo, S-Peterburgo kaj en kelkaj aliaj rusiaj urboj. Ankaŭ ni, uralanoj, pensas, ĉu ne provi niajn fortojn en aranĝo de la propra lingva festivalo?

Ĉuvaŝio – aŭtonomia respubliko (administrita unuo) en Rusio kun ĉefurbo Ĉeboksaro, situas ĉe rivero Volga.

Uralo – geografia regiono ĉe ambaŭ dek-livoj de Urala montara ĉeno, situas meze de Rusio.



100 jaroj de UEA kaj ne nur...

Karaj amikoj!

Vi jam scias, ke en 2008 jaro okazis 100-jariĝo de nia UEA.

Sed en 1908-a jaro estis lanĉitaj ankoraŭ kelkaj signifaj eventoj, kies 100-jarajn jubileojn ni havas ĉi-jare.

100 jaroj de Tunguska katastrofo

Pri tiu ĉi evento ni jam skribis kaj vi povis legi en la tria numero de "K". Tiun ĉi eventon - katastrofon aŭ eksplodon ĉe la rivero Podkamennaja Tunguska oni sufiĉe vaste pridiskutis en gazetaro kaj en TV. Unu el versiojn prezentis Andrej Grigorjev sur paĝoj de "Komencanto". Alia konata versio de la Tunguska eksplodo apartenas al esploristoj de eksperimentoj de fama fizikisto kaj sciencisto Nikola Tesla, kiu inciatas tiun eksplodon en siberia tajgo por pruvi sian teorion pri transdono aŭ transporto de granda energio per elektro-magnetaj signaloj por grandajn distancojn... Ekzistas aliaj versioj de tiu ĉi stranga enigmo, sed dume la sciencistoj ne venis al unuanima konsento pri la kialoj de Tunguska eksplodo.

100 jaroj de seria produktado de aŭtomobiloj "Ford" – fama modelo "T"

Modelon "T" Henry Ford ellaboris kaj "poluris" dum kelkaj jaroj por fari la plej perfektan kaj fidindan maŝinon en sia klaso. La aŭto okazis tiom perfekta, ke dum pli ol 10 jaroj oni nenion ŝanĝis en ĝi kaj ĝenerale estis venditaj pli ol 15000000 specimenoj da tiu modelo!

100 jaroj al internacia signalo de alarmo SOS

Ĝuste antaŭ 100 jaroj estis akceptita kaj disvastigita universala signalo de danĝero en radiotelegrafo – SOS. Tio estas famaj tri punktoj, tri strekoj, tri punktoj < . . . _ _ _ . . . >. Tiun signalon oni ofte provas deĉifri kiel frazon, kiu signifas en la angla SOS = «Save Our Ship» (savu nian ŝipon), aŭ «Save Our Souls» (savu niajn animojn), или «Swim Or Sink» (naĝu aŭ dronos), aŭ «Stop Other Signals» (ĉesu aliajn signalojn). Tamen tiu litera kombinaĵo nenion signifas, ĝi estas nur oportuna por memoro kaj facile komprenata orele kombinaĵo de radiotelegrafaj signoj. Nuntempe oni traktas SOS-on kiel unu el elementoj de kulturo de la XX-a jarcento.

100 jaroj al teaj saketoj

Tiuj bone konataj al ĉiuj paperaj saketoj kun tea infuzaĵo tute ŝajne estis inventitaj dank'al komercisto el New-Yorko Tomas Salivan. En junio de 1908 jaro dum dissendado de specimenoj de teo al eventualaj aĉetontoj, li deziris iomete ŝpari kaj metis po kelkaj pecoj de infuzaĵo en malgrandajn silkajn saketojn. Liaj klientoj, ne ricevinte instrukciojn, enakvigis la saketojn en boligitan akvon. La infuzaĵo dissolviĝis kaj la teo estis preta!



100 jaroj de Somera Tempo

La unuan fojon tiun eksperimenton oni faris en Anglio. Je la 2.00-a horo en nokto inter sabato kaj dimanĉo montrilojn de la horloĝo de la fama turo Big Ben oni movis je unu horo antaŭen. Tiun paŝon la unua en la mondo faris Anglio cele ŝpari elektroenerĝion.

100 jaroj al la unua desegnita filmo

Oni opinias, ke la unua animita desegn-filmo estis "Fantasmagorio" (Fantasmagorie) de la franca desegnisto-karikaturisto Emile Kolja. La unua elmontrado okazis la 17-an de aŭgusto 1908 jaro. "Fantasmagorio" estis farita helpe de malhelaj linioj, pentritaj sur blanka papero kaj poste presitaj sur negativo, kio donis imagon, ke la tiu filmo estis desegnita per kreto. La filmo, kiu daŭris nur 1,5 minutojn estis produktita el 700 desegnaĵoj.

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 20 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas 46-jara. Mi volas korespondi kun esperantistoj el Azio (Japanio, Koreio, ktp), Orienteŭropo aŭ islamaj landoj. **Int:** kulturo, politiko, filozofio, lingvoj, vojaĝoj, muziko, literaturo.

Josefo Martins

Karlsruhe

Germanio

jmartins@web.de

Mi estas komencanto. **Int:** muziko, amikoj, literaturo, lingvoj. Mi volas korespondi paper-poŝte.

Bruno Polo-Riva

Centre Agricole de Casabianda
20270 Aleria Corsica

Francio

Mi estas 27 jara viro, meznivela esperantisto. Mi deziras Eŭropajn korespondantojn.

Vlado Vladov

Ruse

Bulgario

vlado_1980@abv.bg

Mi estas 21 jara studentino, progresanta esperantistino. **Int:** teatro, geamikoj, lingvoj, poŝtmarkoj.

Arkaeva Tanya

Taŝkent

Uzbekio

cool-arta@yandex.ru

Mi estas 41 jara komencanto. Mi estas ŝoforo de buso. **Int:** muziko kaj aliaj temoj. Mi deziras korespondi paper- aŭ ret-poŝte.

Yasuhiro Nagaoka

Yashimajutaku B-5.

Mure 4-22-16, Mitaka-shi
Tokio 181-0002

Japanio

y-nagaoka@topaz.ocn.ne.jp

Mi estas studento. Mi ŝatas korespondi, ricevi kaj sendi bildkartojn tutmonde.

Stefan Kleinhaus

Rodriguez

Finca El Tesorillo2.

11630. Arcos de la
Frontera (C6diz)

Hispanio

kitzogen@gmail.com



Ŝulepov Aleksandr [Vérhoturje, Rusio]

Mi estas 17 jara komencanto. Mi loĝas en urbo Chita, mi ŝatas ludi ŝakon, legi librojn, preferas fikcion, pentri, ludi gitaron. Mi plezure korespondos en Esperanto. Chita troviĝas en fora orienta parto de Rusio.

Shevel Danil

Chita, Rusio

yellow2815@yandex.ru

Mi estas 72-jara emerita statistikisto. Mi petas korespondadon kun proksime samaĝa sinjorino aŭ sinjoro. **Int.:** angla, germana, itala kaj franca literaturo, vojaĝi, montara promenado, teorio de ludoj. Mi verkas germanlingve poemojn.

Magister Ecker

PO Box 176, Balhannah
S.A. 5242, Adelaido

Aŭstralio

magisterecker@hotmail.com

Mi estas 20 jara viro, progresanta esperantisto. Mi estas instruisto. **Int:** instruado de Esperanto; esperantaj libroj; instrumodoj. Mi instruas Esperanton al infanoj kaj gejunuloj kaj mi volas trovi E-instruistojn, kiuj uzas la rektan metodon. Mi preferas paper-poŝton.

Leandro

Abrahão

Uberlândia-MG,

Brazilo

leleabrahao@yahoo.com.

Mi estas 31-jara fraŭlo, kuracisto. Mi estas la sola esperantisto en mia urbo kaj do bezonas praktiki mian Esperanton. Mi tre volonte korespondos paper- aŭ ret-poŝte. **Int:** literaturo, muziko, eksterlandaj kulturoj, ĉiutaga vivmaniero en aliaj regionoj.

Jesuo Cedeco

Apartado Postal 436,

Ciudad Bolivar,

Edo. Bolivar, Cyd.

Postal 8001

Venezuelo

jrcedeno@internet-mail.org

Mi estas 28 jara studento. **Int:** malnova usona muziko, transmonda muziko, volanludo, radio, kantado, dancado, fajfado, filmoj kaj libroj por infanoj, arboj, grundo, Kanado, lingvoj, babilado pri aferoj gravaj kaj malgravaj kaj pri beleco de la homaro. Mi preferas korespondanton kompatan, simpatian kaj aventureman. Se vi aĝas ĉirkaŭe mi kaj ne estas angleparolanto, des pli bone.

Ivanhoe A. Scott

3821 NE 160th Street
Seattle, WA 98155-6600

Usono

ivanhoe@usa.com

Mi estas 20 jara studento pri geologio. **Int:** geologio, kulturo, legado, historio, kolektoj kaj Esperanto. M ŝatas legi, lerni pri alilokaj kulturoj, kolekti mineralojn, poŝtkartojn, monerojn, poŝtmarkojn. Mi ankaŭ ŝatas lerni historion de la landoj kaj, precipe, historion de Esperanto tra diversaj landoj.

Marcelo Mota

Rua Professora Marli de

Figueiredo, 237/602,

Casa Caiada, Olinda,

Pernambuco,

CEP 53130-310.

Brazilo

marcelo_eo@yahoo.com.br

Mi estas 24 jara fraŭlo. Mi estas soldato. Mi planas esti instruisto pri komputiloj. Mi deziras korespondi kun esperantistoj tutmonde.

Fidel Bassene

Senegalo

fidelbasen@yahoo.fr

komencanto@r66.ru
<http://esperanto-plus.ru/korespondaservo.htm>

